

N° 01 1972

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

Nº 1 - 2 Januaro kaj Februaro 1972-a 22-a Jaro

## FROSTAVALLEN EN 1972

Ni antaŭe informis, ke Sveda Somera Semajno, la tre konata, altnivela prelegsemajno denove okazos en Frostavallen (en la suda parto de Svedujo) en la jaro 1972 (la 30-an de julio - 6-an de aŭgusto).

La temaro nun estas fiksita: LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO-kun speciala atento al la situacio en Eŭropo. Prelegos: Prof.D-ro Ivo Lapenna, Britujo. D-ro W.Bormann, Germanujo. D-ro J.C.Wells, Britujo. S-ro Jean Thierry, Francio.

Aldone al la ĉefa temaro okazos diskutoj pri internaj problemoj de la movado laŭ titolo: PERSPEKTIVO DE ESPERANTO KAJ VOJOJ POR LA ESTONTA AGADO - ĉu la nuna laborprogramo de U.E.A. estas adekvata?

Petu informojn pri la prelegsemajno ĉe S-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo.

Sveda Esperanto-Instituto

## NOVAĴOJ EL LA ESPERANTA GAZETARO

El "ESPERANTO" Oficiala Organo de U.E.A.- N-ro 793 (1) Januaro 1972-a.

KOMENCIĜIS KOLORA TELEVIDA KURSO EN NEDERLANDO: La pli populara el la du televidaj kanaloj en Nederlando elsendas Esperanto-kurson en koloro, ekde januaro 1972-a, en plej bona tempo, t.e. en dimanĉaj vesperoj (kun ripeto en sabatoj). Kiel jam anoncite, en ĉiu leciono estas skeĉo fare de du komedi-istoj. "Ridante lerni Esperanton" estas ilia moto.

LIBERA TERITORIO "INSULO DE LA ROZOJ": La fame konata "Insulo de la Rozoj", artefarita insuleto konstruita en la maro antaŭ Rimini kiel "sendependa Ŝtato" kaj detruita de la itala armeo en 1969-a, troviĝis ekster la italaj teritorio kaj akvoj. Tiel verdiktis la Eŭropa Parlamento, al kiu sin turnis la konstruintoj de la "insulo". Ili nun direktos siajn kompenso-postulojn al la Internacia Kortumo de Hago.

## HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

— sub aŭspicio de UEA —

Budapest, 17—23. julio 1972

### PROVIZORA PROGRAMO

*LUNDO, 17. 7.*

Posttagmeze: — Solena inaŭguro
Vespere: — Interkona vespero

*MARDO, 18. 7.*

Antaŭtagmeze: — Vizito de bildekspozicio en la Belarta Muzeo
— Enketo por la verkistoj, jurnalistoj, artistoj partoprenantaj en la HKF: "Rolo de la esperantista artisto en la movado"

Posttagmeze: — Malfermo de ekspozicioj kun gvidado:
— Folkloro
— Esperantistaj belartistoj
— Foto
— Literatura programo "Perloj de la hungara literaturo" (De la komenco ĝis 1945)

Vespere: — Liberaera koncerto

*MERKREDO, 19. 7.*

Antaŭtagmeze: — Vizito al la Hungara Nacia Galerio kaj al la Parlamentejo
Prezentado: — Kantoj kaj ĥoroj
Posttagmeze: — Literatura programo: „La nuntempa literaturo en la Hungara Vivo" (HV prezentas la nuntempan hungaran literaturon)
Vespere: — Filmprezentado

*JAŬDO, 20. 7.*

EKSKURSA TAGO — Elekteblaj programoj: (aparte mendebla)
1. Vizito al Esztergom kaj Visegrád
2. Vojaĝo al Balatono
3. Vizito de hungara pejzaĝo: specifaj manĝaĵoj, ĉevalrajdado kaj aliaj

*VENDREDO, 21. 7.*

Antaŭtagmeze: — Vizito al la Historia Muzeo (Fortikaĵo de Buda)
Posttagmeze: — Teatra programo
Vespere: — Folklor-programo
Vespere, malfrue: — Beat nokto por la junularo

*SABATO, 22. 7.*

Anatŭtagmeze: — Pupteatra prezentado
Posttagmeze: — Filmprezentado
Vespere: — Muzika vespero de fortepian-artisto Imre Ungár

*DIMANĈO, 23. 7.*

Antaŭtagmeze: — Ferma kunsido
Posttagmeze: — Elekteblaj programoj:
— Ekskurso al la Esperanto-fonto
— Danuba promenado per ŝipo

Okazos laŭdezire kunvenoj de diversaj fakorganizaĵoj.
Por ili ni certigas lokon. Urborigardoj ĉiutage!

## 24-a I.F.E.F.-KONGRESO EN LUGANO

DATO: De la 6-a ĝis la 12-a de majo 1972-a.
KONGRESKOTIZO: De la 1-a de februaro ĝis la 12-a de aprilo 1972-a: Sv.Fr. 50 (£.6000). (Ne IFEF-anoj Sv.Fr.65. Familianoj, pensiuloj kaj gejunuloj ĝis 20-jaraj pagas la duonon.
EKSKURSOJ: En la programo estas 2 duontagaj ekskursoj kaj unu tuttaga ekskurso, je la lasta kongrestago al Lucerno. Krome estas du duontagaj ekskursoj el kiuj vi povas elekti: vizito al nova varstacio Chiasso aŭ al ĉefriparejo en Bellinzona.
PROGRAMO: Vi trovos ĝin sur paĝo 4 de la aliĝilo.
ALIĜILOJN: Vi povas peti ĉe la sekretario: Via Donato Creti, 61 I-40128 Bologna. Por ĉiu aliĝonta persono bezonos aparta aliĝilo.
KONGRESA LUNĈO: La kongresa lunĉo okazos dimanĉe inter la solena malfermo kaj la ekskurso. Ĝi ne estas bankedo, sed prezinda rapida kaj tamen kompleta manĝo (inkluzive servon kaj kvaron -litron da vino). Dum dimanĉo granda parto de memservaj restoracioj estas fermitaj, krom tio, en la urbo estas ĉiam multaj turistoj el proksima Lombardio; pro tio ne eblos al tia homamaso, kiel reprezentas niaj gekongresanoj, trovi lokon en proksimaj manĝejoj kaj samtempe esti rapide servota.
L.K.K. konsilas al ĉiuj mendi la kongresan lunĉon. Antaŭmendo estas nepre necesa. La prezo estas Sv.Fr. 12 (£.1'800).
PAGO: La pagendan sumon, laŭ la plenumita aliĝilo, vi pagu rekte al Banca Popolare Svizzera Lugano per Poŝtĉekkonto aŭ Bankkonto indikitaj sul la aliĝilo.

## A L L U G A N O

### RENKONTE AL AKTIVA PRINTEMPO

Lugano, ĉe la lago de Lugano estas la brilpunkto de Tiĉino, kiu ne konas ekstremajn sezonojn. Ĝiaj preferoj estas egaliga klimato, la arttrezoroj kaj neelĉerpeblaj elektoj de ekskurs- kaj migradeblecoj. Unua vagado tra la urbo kun ĝiaj pitoreskaj arkadoj, mirindaj renesancaj kaj barokaj preĝejoj kondukos nin al la lagopromenejo, ornamita per palmoj kaj floroj. La nova urboparto montras modernajn hotelojn, sed tuj ni konstatas ke Lugano posedas ne sole luksajn hotelojn por la superaj dek mil homoj, sed ankaŭ komfortajn hotelojn plimodestprezajn, same restadejojn por turistoj kiuj emas pilgrimi. La eleganta Lugano ofertas samelegantan strandpromenejon, du sportcentrojn (unu kun halo-banejo), diversajn kulturajn kaj sportajn aranĝojn,hazardludejon, noktajn klubojn, diskotekojn, tenisejojn, golfon kaj la eblecon apliki ĉiujn aliajn somerajn sportojn.

Flanke de la urbo staras Monte Bré kaj Monte San Salvatore, kies suproj per funikularo estas senpene atingeblaj. Regule veturantaj ŝipoj interligas Lugano kun romantikaj ĉelagaj vilaĝoj Gandria, Campione, Bissone, Melide (vizito de Swissminiature) kaj Morcote.

De Brusino-Arsizio oni lasas sin suprenporti per telfero al Serpiano aŭ oni ĝuas veturadon per dentrada fervojo de Capolago al Monte Generoso aŭ pere de seĝtelfero de Migliega al Monte Lema, de ĉiuj tiuj montsupraĵoj sin prezentas admirinda panoramo trans Alpoj kaj Po-ebenaĵo.

Interesa estas ankaŭ etaj ekskursoj per aŭtobusoj al Sonvico, Tesserete kaj al Origlio-lago, aŭ pere de mallarĝspura fervojo al la Muzzana-lago kaj al Malcantone-regiono.

Almenaŭ 100 da tiaj ekskursoj kun pli ol dek transportrimedoj prezentas ĉiam novaĵojn kaj surprizajn impresojn.

Lugano oni ne povas dum unu ferio elĉerpi kaj ĝi estas fakte la ĝusta celo por aktiva ferio de dinamikaj homoj.

Kurt GREUTERT

VENITE IN MASSA A LUGANO PER IL 24° CONGRESSO INTERNAZIONALE DEI FERROVIERI ESPERANTISTI - Dal 6 al 12 maggio 1972. CHIEDETE L' "A L I Ĝ I L O"!